



TEA-BULTENO

22^A JARO - N° 147

JANUARO-FEBRUARO

N. 1-2/2019

Esti proprahejme en la kultura mondo signifas loĝadi en multaj mondoj, en multaj idiomoj: signifas troviĝi siahejme en la historio de la ideoj, en la literaturo, en la muziko, en la artoj. Tio postulas erudicion kaj kapablon kapti la rilatojn inter diversaj mondoj: la interligitecon.
George Steiner, franca verkisto kaj eseisto (1929)

Serenan kaj Pacan 2019^{ma} Jaron!

Ni jam enpaŝis en la novan jaron kaj launua demando ekestas: kio troviĝos sur la **vojo** longa 365 tagojn, staranta antaŭ ni? Estas pli bone ne tiom cerbumi, ĉar plej ofte neniel ni povas kontraŭstari la sinsekvon de eventoj, ĉu pozitivaj ĉu malpozitivaj. Certe ke ankaŭ multo dependas de ni mem, de niaj agadoj, de niaj faroj, de nia konduto, de nia sinteno al aliaj, sed okaze ke ni estu senpovaj, ke ni devu akcepti, kion ajn la sorto prezentas al ni, ni tamen ne perdu esperon, ni ne permesu al malbonaĵoj superregi nin kaj ni sekvu la tiel profundajn spurojn lasitajn de nia Majstro, kaj pluiru, energie, ĝoje, fide kaj fidele al niaj kredoj.

Ĉu ni legu kune la unuajn du versojn de Lia

LA VOJO

*Tra densa mallumo briletas la celo,
al kiu kuraĝe ni iras.*

*Simile al stelo en nokta ĉielo,
al ni la direkton ĝi diras.*

*Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
nek batoj de l' sortoj, nek moko de l' homoj,
ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
ĝi estas, la voj' elektita.*

*Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante,
ni iru la vojon celitan!*

*Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
traboras la monton granitan.*

*L' espero, l' obstino kaj la pacienco –
jen estas la signoj, per kies potenco
ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
atingos la celon en gloro.*

Ĉu vi rememoras nian karan Gianfranco Molle, kiam li tiel elkore kaj kortuŝe ĝin kantis akompane de sia gitaro? Ni aŭskultu per la koro ĉi kanton kaj priatentu ĉiujn vortojn! Ĉar en tiuj vortoj kuŝas nia estonteco! **Via redaktanto Elda**

ESTONTECE,

KIO TUTCERTE OKAZOS EN TRIESTO?

LA 86^A ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

de la 24^a ĝis la 31^a de aŭgusto 2019

La temo estos: Multkulturismo kaj plurlingvismo hodiaŭ. Estas ankoraŭ tempo ĝis la fino de januaro por aliĝi malplikoste. Oni estas preparantaj grandiozan programon, kun eminentaj prelegantoj. Kursoj pri Esperanto. Ekskursoj en Triesto kaj ties ĉi regiono. Spektakloj. Koncertoj. Bonvole vizitu la paĝaron prikongresan kie vi trovos plurajn informojn pri loĝado kaj la celoj de viaj ekskursoj. <http://kongreso.esperanto.it>. Triesto atendas vin: oni jam mendis belan sunradian veteron, bluan ĉielon kaj freŝan markvon! **Bonvenon al vi ĉiuj!**



Biblioteka Apogo Bachrich subvenciis la TEA-bibliotekon

Ree la Fondaĵo "Biblioteka Apogo Honore al la Geedzoj Maria kaj Johano Bachrich", kies celo estas subteni kaj pliriĉigi la kolektojn de E-bibliotekoj, asignis subvenciojn - uzeblajn por akiri librojn aŭ aliajn varojn aĉeteblajn ĉe la Libroservo de UEA - al kelkaj asocioj tra la mondo.

Ĉi-sube la listo de libroj ricevitaj ĉi-jare:

1. Ludovikologiaj biografietoj - *ludovikito*
 2. La neforgeseblaj Kongresoj - *ludovikito*
 3. La strato de Tanja - *Kalle Kniivila*
 4. Idoj de la imperio - *Kalle Kniivila*
 5. Lidia - La vivo de Lidia Zamenhof filino de Esperanto - *Wendy Heller*
 6. Antaŭ unu jarcento. La granda milito kaj Esperanto - *Javier Alcade kaj José Salguero*
 7. Josef Ŝemer 1950-2012 - *Diversaj*
- TEA-estraro invitas la membrojn esplori sian riĉan bibliotekon kaj pruntepreni la preferatan libron.

Koran dankon al la Fondaĵo kaj UEA!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
Kunventagoj: mardo 18-20; 20-22; vendredo 19-21
Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936
Banka Konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
Asociaj ttt-ejoj: www.esperantotrieste.altervista.org;
www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org



Ĉnkorra ĉesperantisto: Alfonso Cuarón Orozco

Naskiĝinta en 1961, en Meksikurbo, Alfonso Cuarón estas filmreĝisoro, scenredaktoro, film-muntisto kaj produktoro.

En la nacia Universitato de sia naskiĝurbo li studas kinartron kaj filozofion, sed ne finas siajn studojn, pro konflikto kun la universitata direktoraro. Li eklaboras por la meksika televido kaj realigas sian unuan kurtfilmon, per kiu li elmontras sian grandan talenton. Tro longas la listo de liaj verkoj, nur menciindas la plej konataj, de la 2000^a jaro ĝis hodiaŭ: la tria sagao de Harry Potter, "Harry Potter kaj la kaptito de Azkabano", la "Filoj de l' homo", "Graveco" kaj "Roma". En 2014 li ricevis sep Oskar-Premiojn. Pliaj informoj troveblas kompreneble en Vikipedio.

Kial ĉi tiu biografio? Unue, ĉar la filmprodukta firmao de A. Cuarón nomiĝas "Esperanto Filmoj" kaj due, ĉar 'ŝajnas' ke li parolas esperanton kaj simpatias nian Aferon. Sam Green* havis kun li intervjuon, je la 17^a de januaro 2013: jen kelkaj eroj el ĝi.

Sam Green: Do, kio inspiris vin elekti tiun nomon por via firmao?

Alfonso Cuarón: Esperanto ĉiam fascinis min. Mi memoras la unuan fojon kiam mi eksciis pri Esperanto, tra la hispana aŭtoro Miguel de Unamuno, filozofo (1864-1936). Unu el la roluloj en la libro "Niebla" estas ekstravaganca anarkiisto kiu parolas Esperanton kaj neniu lin komprenas. Nur poste mi ekkomprenis la tutan aferon, la ideon de Zamenhofo, de la universala lingvo kiu kunigos la tutan mondon. [...]

Mi kreis filmojn en diversaj landoj, kaj mi pensas ke la homoj, kiam ili naskiĝas, estas ĉefe homoj, kaj nur poste ili ricevas pasportojn. Do, mi serĉis nomon kiu subtenas tiun sencon de "universala lingvo". Malgraŭ iuj miaj kritikoj, mia koro daŭre subtenas la ideon de Esperanto.

SG: Nu, estas amuze; mi iom sentis tion simple tra la filmo "Filoj de homo", kaj evidente la mallonga filmo "The Possibility of Hope" (La ebleco esperi) vere efikis sur min emocie pro siaj temoj de espero kaj imago pri estonteco, esti kapabla imagi estontecon radikale malsa-

man. Tio, laŭ mi, estas unu el la ĉefaj esencoj de Esperanto.

AC: Mi estas tre esperoplena, tre optimisma homo. Eble mi estas pesimisma pri la nuna situacio, sed mi daŭre estas optimisma pri la estonteco. La problemo estas, ke mi malamas tiun optimismon kiu bremsas nian progresadon. Mi kredas, ke unue ni devas analizi kaj kompreni, kie staras la problemo. Ĉar se tiu ĉi ne klaras, kiel ni povus ion ŝanĝi? Mi scias, ke Esperanto havis bonajn kaj malbonajn tempojn, sed ĝia pureco konsistas ĝuste en tio. Ĉar ĝi estas utopio, afero tre pura kaj arta. Estas la ebleco de komunikado interhoma.

SG: Parolante pri komunikado, ĉu vi havas ion por diri al la Esperanto-mondo?

AC: Nu, mi bedaŭras ke mi ne povas diri ĝin esperantlingve! Mia koro estas kun ili. Ĝi estas unu el tiuj aferoj kiuj... eble estas iu vojo por ke ĝi okazu, per kiu la Esperanto-movado eksplodus. Mi ne scias. Estus bonege - ĝi estas bonega ideo, elstara koncepto. Kaj ankaŭ la fakto ke homoj estas lernantaj Esperanton. Mi estas feliĉa ĉar estas personoj kiuj reale sekvas la ideon kaj praktikas la lingvon. Ankaŭ mi ĝojas vidi, kiom vasta la komunumo estas. Ne estu surprizo, tamen, ke la grandaj ideologioj persekutas Esperanton, ĉu ne? Ekzemple, dum la pasinta jarcento, la nazioj kaj poste Stalin decidis, ke ĝi estas danĝera.

[...]

SG: Ĉu ie troviĝas oficejo de via firmao, kun "Esperanto Filmoj" sur la ĉefa pordo?

AC: Ha! Kie mi loĝis, tie estis la oficiala sidejo de la firmao; ĝia nomo estis manskribita sur eta paperpeco kaj algluita per glubendo.

[...]

SG: Multajn dankojn pro la konversacio.

AC: Nedankinde! Salutojn!

Tiel finiĝas la intervjuo kun A. Cuarón, okazinta antaŭ ĉ. 6 jaroj. Sed intense li daŭrigis reĝisori, produkti, munti ks: multege li laboris kaj prezentis al la publiko interesajn spektindaĵojn. Lia plej lasta verko estas la dramfilmo: "Roma" (2018), ricevinta la premion ORA LEONO dum la 75^a Venecia Festivalo. Unu el priaj multaj komentoj: "Portreto de homa indeco tiel profunda kaj nefordonebla, kapabla transformi ĉion en korŝiran belecon".

*Sam Green estas filmreĝisoro de San-Francisko, Usono. Li specialiĝis pri dokument-filmoj. Lia filmo "The Weather Underground" estis nomumita por Oskar-premio en 2004. La filmo "Utopia in Four Movements" (Utopio en kvar movadoj) amplekse pritraktas la internacian lingvon Esperanto.

Fontoj: Vikipedio; Hispana Esperanto-Federacio.

Tradukis la intervjuon de la hispana al la itala, Julio Ortega; de la itala al la esperanta, ED.

Estontece, kiu lernos lingvojn?

En la Kristnaska mateno, mi aŭskultas televide, krom emociaj kristnaskaj muzikaĵoj, ankaŭ Papon Francisko, kiu finas sian kristnaskan mesaĝon per la tradicia Apostola Beno *Urbis et Orbis*. Ĉeftemo estas la frateco: "... inter personoj el ĉiuj nacioj kaj kulturoj; ... inter personoj kun malsamaj ideoj, sed kapablaj respekti unu la alian kaj aŭskulti ĉies voĉon; ... inter personoj el diversaj religioj...". Ah, se ĉiu homo sekvus nur tiun ĉi konsilon, ni ne plu vivus surtere, sed en ... Paradizo! Daŭrigante, la Sankta Patro enfokusigas denove siajn pensojn sur "ĉi nian kompatindan homaron kiun ni kundividas en granda vario de etnoj, lingvoj, kulturoj..., sed ĉiuj *fratoj homarane!*" Ĉi lasta frazo rememorigas al ni iun alian personon, ĉu ne? Tamen mia ĉefcelo estas aliaĵo, nome unu el la finaj Papaj eldiraĵoj: "Karaj fratoj kaj fratinoj, venintaj el Italio kaj diversaj Landoj, kiel ankaŭ tiuj kiuj nun estas kunligataj pere de radio, televido kaj aliaj komunikiloj..."

Strange, pro ia eble misa konektiĝo de miaj neŭronoj, tiuj vortoj - radio, televido, aliaj komunikiloj -, revenigas al mia menso artikolon legitan antaŭ du, eble eĉ tri monatoj, kiu koncernis ĝuste "la aliajn komunikilojn", perretajn ĉefe, tiujn ĉiam pli avangardajn teknologiajn sistemojn de informado/komunikado.

Scienco progresas, rapide, fulmrapide: fakte mi legas konsternite: "Sufiĉas 12 neŭronoj por parki aŭtomobilon". Ja temas pri nerva cirkvito, (en realiga fazo), kiu inspiriĝas el tiu, la plej priesplorata, vermo *Caenorhabditis elegans**, - por kontroli etan robot-aŭtomobilon, ĝin movigi kaj parki. Alia sensacia atingo: mikrobatoj kiuj potencigos la homon - inter ĝiaj povoj estos la havigo de pli bona memorkapablo, de kapablo movi robotan brakon per la menso kaj vidi eĉ se oni estas blinda... Ne nur pri tiaj tre gravaj novaĵoj estis legeble, sed ankaŭ ke hodiaŭ oni tre serioze estas pristudenta la manieron por fine eldetru la Babelan turon, ebligante interparoladon kun ĉiu ajn persono, sen tio ke la idiomo fariĝu barilo neforgebla.

Ĉiu el vi bone konas la funkciojn de la Gugla tradukilo, kaj oni ĝin jam plurfoje uzis, kaj uzas. En la fora somero de la jaro 2000 ĝi naskiĝas, kaj de tiam multon ĝi evoluadis. Kompreneble ĝi ne estas sendifekta, tamen eblas transtradukado de simplaj frazoj enhavantaj malmultajn erarojn: mi persone multfoje ĝin utiligas, malgraŭ ke poste mi devas dediĉi iom da tempo por ia plibonigado. Estontece tamen ĝi transformiĝos, danke al la elserĉado kaj

sistema scienca pristudado de la futurologo kaj kibernetikisto *Ray Kurzweil*, kiu asertas ke de 2029 aŭtomata tradukado anstataŭos la homon. Komplika kaj kompleksa estos, kompreneble, la tuta afero; multaj el ni neniam havos la ŝancon ĝin testi, sed la estontaj generacioj certe ĝin ĝuos. Kaj la rezulto de ĉio ĉi? Simple: unue oni ne plu devos ellerni aliajn lingvojn - ĉiel ajn oni ŝparos multe da tempo (... kaj energio, kaj mono!), tempo kiun eblos dediĉi al aliaj studoj, samkiel la nuntempaj anglalingvanoj kiuj studas nenium alian lingvon krom la sia. Nu, ĉu tiu sistemo helpas ankaŭ dum legado de alilingvaj literaturaĵoj, aŭ ĉio entute estos tradukita al ĉiu ajn lingvo? Kaj se, malgraŭ la nedubinda perfekteco de tiu sistemo, naskiĝus miskomprenoj, ekestus iom erara traduko, kiel eblos korekti la misaĵojn? Ja, en la nuna momento, almenaŭ mi ekvidas multajn problemojn, ankaŭ ĉar mi ne situas je tiaj altgradaj niveloj de scio kaj kompreno, sed prikonsiderindas, ke la historio multfoje instruis, ke kio iam ŝajnis neebla, nun apartenas al nia ĉiutagaĵo: la vojo estas larĝe malfermita al la sciencistoj, eĉ se plena je obstakloj, kaj se ĝi longos pli ol antaŭvidite, certe pli aŭ malpli frue oni atingos la celon: restas nenio alia aldonenda, eble nur: "Al idoj juĝ' malfacila".

Interese estas, tamen, ke multaj gravaj homoj, en estinteco kaj estanteco, donis voĉon al siaj pensoj rilate al lingvoj kaj tradukadoj:

José Saramago - portugala verkisto kaj ĵurnalisto. *Verkistoj kreas nacian literaturon, dum tradukistoj igas universala la literaturon.*

Arthur Bloch - usona humoristo kaj verkisto. *Se leĝo estas netradukebla, tiam ĝi aplikiĝos.*

Voltaire - franca filozofo. *Kiam oni ektradukas, oni devas elekti la aŭtoron, samkiel oni elektus amikon, nome iun havantan saman guston kiel la propra.*

George Steiner - franca verkisto kaj eseisto. *Sen tradukado ni loĝus en provincoj ĉelimaj, mutaj.*

Claudio Magris - triesta verkisto. *Unu el la plej belaj aferoj, kiu povus okazi al la tradukito estas la konsciĝo, ke pli pravus la tradukinto ol li mem.*

★ Model-organismo, tre taŭga por genetika kaj alia biologia esploro, kiu manĝas bakteriojn kaj gistojn (el Vikipedio: foto de By Bob Goldstein, UNC Chapel Hill <http://bio.unc.edu/people/faculty/goldstein/> - Propra verko, CC BY-SA 3.0, <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=6797591>)

Jen alia flanko de la progreso.

Alarmkrio lanĉita de la itala

AKADEMIO DE LA CRUSCA [elp: Kruska]

Ene de 2050 malaperos la duono de la vortoj

En 2300 ĝi povus entute estingiĝi



Mi konsentas, ke kiu estas leganta ĉi Bultenon, eĉ se itallingvano, tuj rebatus: "Tio ĉi tute ne concernas min, en tiu forega jaro de mi eĉ ne unu cindrero restos! Kial mi devas pro tio ĉagreniĝi? Tio ja estos problemo de miaj prapra-pra-ktip-aj posteuloj!" Jes, iasence prave, sed por mi estas iom ŝoka tiu aserto. Doloras min la fakto, ke la itala lingvo kaj, jam multe pli frue, ankaŭ la triesta dialekto, en ne tiel fora tempo ne plu estos parolataj.

Ĉio ĉi tiklas mian scivolemon tiel, ke mi ekserĉas statistikojn pri lingvoj je malapera risko, ĵus malaperintaj aŭ baldaŭ mortontaj. La bildo pri la situacio estas vere katastrofa. Konsilindas, fari la saman esploradon: oni konscios, pri kiom da idiomoj estas en danĝero. Ĉiujare

dekoj da foriĝas. Malapero de lingvo egalas al malapero de kulturo, perdo de memoro, silento kiu peze kovras per sia nigra mantelo lingvaĵojn ĝissufoke, tiujn samajn lingvaĵojn, kiuj iam estis plenaj de viveco kaj vogleco, per kiuj oni esprimis ĉian homan senton, en kiuj nestis kulturo, emocioj, scioj, ideoj... ĉio!

Multaj demandoj afiŝiĝas antaŭ la okuloj: ĉu komputiloj mortigos la lingvojn kaj malaperos la tradukistoj? Ĉu la itala lingvo vere foriĝos? Kiu(j) estos la plej parolata(j) lingvo(j) en la estonteco?

Per tiuj ĉi demandoj finiĝas la unua parto de ĉi mia artikoleto. La duan parton oni trovos en la Bulteno marta-aprila. Intertempe mi atendas viajn reagojn, je ties kompletigo. *EIDO*

LA REALA KOSTO DE TOMATOJ:

Kio plej kostas? La ujo aŭ la tomatoj mem?

Kiam okazis tiu homa tragedio (aŭguste 2018) pri la 16 taglaboristoj el afrika deveno, ekspluatataj en la tomataj kampoj, tiun fakton mi kunligis al sklavismo, kiu en la nuna mondo fariĝas pli kaj pli tolerebla, sendepende de la haŭtkoloro, de fremdeco aŭ io alia, ĉar ĝi aplikigas ankaŭ al la italoj mem, kiuj de dekoj kaj dekoj da jaroj, eĉ antaŭ la alveno de tiom da migrantoj, havis (kaj havas) la saman traktadon.



Kontraŭ kelke da eŭroj tage, sen regulaj kontraktoj kaj sen ia ajn asekurado. Antaŭ ol daŭrigi ĉi artikoleton, mi malfermas parentezon kaj invitas vin pripensi pri la jeno: "Kio

supre dirite, ne estas aparta, nur itala, fenomeno, ĝi estas ordinare uzata en pluraj aliaj landoj – kaj mi parolas nur pri eŭropaj landoj! – ĉar en la hodiaŭa tagĵurnalo (27.12.2018) mi legas, ke labormigrantoj de X-Lando al Y-Lando, dungitaj danke al duflanka traktato inter la laboragentejoj de la du Ŝtatoj, denuncis al sia hejmlando la diversspecajn mistraktadojn en la gastiganta lando kaj plenan malobservadon de la leĝoj pri dungado. Laŭ la laborista denunco, oni devigas ilin labori dum 18 horoj/tage po 4 eŭroj hore; plie oni ne pagas regule la salajrojn, ne pagas la kromlaborajn horojn, kaj fine la laborkondiĉoj estis neimageble malsekuraj." Tute ne bezonatas priaj komentoj, ĉu ne?

Sed ni revenu al niaj "tomatoj"! Alia konsterna faktoro estas, ke tiuj miloj da sezonlaboristoj, ekspluatataj en la itala kamparo, perforte devas submetiĝi al la krimaj laborperantoj. Kaj tiaj kondiĉoj estas favorataj de la grand-

distribua sistemo, kiu sukcesas per siaj aĉetokaj vendo-povoj malaltigi la prezojn de ĉiuj nutrovaroj, inkluzive la tomatojn, kiel estis denuncite de pluraj asocioj de konsumantoj, reprezentantoj de sindikatoj kaj *Slow Food* (internacia senprofitcela asocio, engaĝiĝanta por redoni valoron al nutraĵoj, respektive de la personoj, medio kaj lokaj tradicioj). Precipe en la rabatvendejoj estis faritaj skrupulaj kontroloj, el kio rezultis ke iu konata rabatvendejaro akaparis al si subkoste dudek milionojn da boteloj el kribritaj tomatoj kontraŭ 0,35 € ĉe retaŭkcio je duobla prezmalaltigo. Tio ĉi estas tute kontraŭleĝa agado, pro kiu multaj protestas kaj postulas ĝian nuligon, ĉar ĝi malriĉigas la produktoĉenon kaj kontribuas al ekspluatado de la kamparaj laboristoj.

Ni faru du kalkulojn, por demonstri, kiel tiu sistemo estas danĝera por justa distribuado de enspezoj/elspezoj ekde la produktantoj ĝis la sekvaj prilaborantoj de la varoj.

En 2017 la rezulto de la kalkulado estis la jena (ĝi estas ankoraŭ aktuala ĉar la prezoj de tomatoj en 2018 ne variis): 79,75 €/t egalas al ĉ. 0,08 €/kg. Por havi 1 kg-on da kribrita tomato bezonatas 2,5 kg-oj da freŝa tomato: je la fino la produktanto ricevas po 0,20 € kilograme. Al tio oni devas adicii la elspezojn por la transformado de la produkto: 18-20%; aranĝado de la ujo: 13-14%; transporto kaj reklamado: 7%; AVI (aldonvalora imposto) kaj gajno de la superbazaro: 45-50% ĉ. Konsekvenca la "kruda materialo" pezas sur la tuto malpli ol 10-procente.

Coop garantias la entutan spureblecon de ĉiuj transigaj fazoj de la produkto kaj plie subskribigas etikan kodon al la liveranto, kiu sin devontigas respekti la rajtojn de la laboristaro.

Kiam la boteloj ekkuŝas sur la bretoj de la superbazaroj, la vendoprezoj prezentiĝas tre variaj: bone konataj kaj kvalitataj (*almenaŭ oni esperas, ke tiaj ili estu!*) fabrikmarkoj la prezo averaĝe egalas al po 2,30 € kilograme, dum

en la aliaj rabatvendejoj ĝi ondas de 0,74 € ĝis 1,28 € kilograme. Oni tamen devas pri-konsideri, ke ofte estas prezorabatoj, kun mal-altigitaj kostoj, kiuj tamen ĉiam garantias gaj-nomarĝenon. Aliaj fabrikmarkoj proponas tian tomaton rezultitan de la unua rikolto, do la plej altkvalitan, kiu estas prilaborita kaj tuj enskatoligita aŭ enboteligita: ĝenerale la terkultivisto ricevas pli ol la duoblon de la norma mala prezo. Kiam oni uzas tomatojn de la dua rikoltado kaj la prilaborado kaj enujigado estas farita post multe da tempo, eĉ monatoj, la travidebleco de la prezo ne ekzistas, tiam oni utiligas aŭkciojn je duobla prezmalaltigo: tiu-okaze la terkultivistoj por egaligi la kontojn ekspluatas ĝisekstreme la migrantan laboristaron. Bonŝance tiajn rimedojn multaj superbazaraj kompanioj jam rifuzas kaj multaj povas pruvi sian honestecon, per la totala spur-ebleco de siaj produktoj, inkluzive de mal-ekspluatado de laboristaro.

La solvo estas komplika kaj kompleksa, ankaŭ ĉar la "merkato de la ruĝaj tomatoj" estas unu el tiuj kie malmultaj estas la reguloj kaj tre forta estas la konkurado. *Slow Food* proponas indiki sur la etiketoj la aĉetokoston de la kruda materialo. Alia ebleco estas ekirigi travideblan proceson bazitan sur pakto inter produktantoj, superbazaraj kompanioj, industrioj pri transformado de la produkto kaj terkultivistoj, fiksante la justajn gajnamarĝenojn por ĉiuj, tiel ke oni ne strangolu la merkatojn kaj garantiu al la laboristoj la plenan respekton de iliaj rajtoj.



Ĉi-flanke la freŝdata libro, per kiu Jean-Baptiste Malet denuncas la kritecon de ĉiuj stadioj, laŭlonge kiujn en la mondo la kruda materialo - en ĉi okazo la tomato - transformiĝas en finprilaboritan produkton, disponigotan al la konsumantaro. Ĝia titolo estas: **PUTRA RUĜO**. Temas pri "Konsterna internacia enketado pri la tomatoj kiujn vi surtabligas."

Ekspluatado kaj sklavismo estas la reguloj kiuj ofte regas en agrikultura laborsektoro: kiel ni povas kontraŭstari tian situacion kaj kiel haltigi tiajn fiaĵojn? Nur per disvastigado de similaj informoj, per denuncado de kontraŭleĝaj agadoj kaj per forrefuzo aĉeti varojn tro malmultekostajn: minimume tio ĉi devus esti nia konduto, kio povus esti unu el la plej simplaj rimedoj kiujn ni havas je nia dispono.

Tradukis kaj kunmetis E.D.  **il fatto alimentare**
El www.ilfattoalimentare.it

Programo - Januaro 2019

4a, vendredo	14h50 - Esperanto en alirprogramoj RAI UNO - LITERATURAJ KONKURSOJ DE ITALA ESPERANTO-FEDERACIO. 20h00 - ttt-ejo pri la Itala Kongreso.
8a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj.
11a, vendredo	19h00 - Laborgrupo por la Itala Kongreso. 20h00 - Bildoj pri Portugalujo.
15a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj.
18a, vendredo	20h00 - Legado de la verko de Aleksander Korĵenkov - <i>Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof.</i>
22a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj.
25a, vendredo	20h00 - Memoroj pri UK 2017 - Koreio.
29a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj.

Programo - Februaro 2018

1a, vendredo	20h00 - El niaj E-ĵurnaloj
4a, lundo	14h50 - Esperanto en alirprogramoj RAI UNO - NOVAĴOJ PRI LA ITALA E-KONGRESO EN TRIESTO.
5a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj.
8a, vendredo	20h00 - Legado de la verko de Aleksander Korĵenkov - <i>Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof.</i>
12a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj.
15a, vendredo	20h00 - Ĉu ni krucvortumu?
17a, dimanĉo	10h00 Ĝenerala TEA-Asembleo Sekvos komuna tagmanĝo
19a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj.
22a, vendredo	20h00 - Legado de la verko de Aleksander Korĵenkov - <i>Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof.</i>
26a, mardo	18h00/20h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj.

ORDINARA JARA ASEMBLEO DE TEA

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos **dimanĉon la 17^{an} de februaro 2019 je la 10h00, unua kunvoko, kaj je la 10h30, dua kunvoko.** Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro da partoprenantoj.

TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj la sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 2018:
 - a) Morala raporto de la prezidanto (*Edvige Ackermann*).
 - b) Agadraporto de la sekretario (*Elda Doerfler*).
 - c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto (*Edvige Ackermann*).
 - ĉ) Deklaracio de la revizoroj (*Amalia Zerpini - Giuseppe Valle*).
 - d) Raporto de la triesta katedrestro (*Elda Doerfler*).
4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

DELEGILO

La asocio _____

estas delegita anstataŭi min ĉe la Jara Asembleo de TEA, okazonta dimanĉon la 17^{an} de februaro 2019.

Subskribo _____

Dato _____

Notu bone!

Okaze de la Asembleo eblos pagi al la kasisto la renovigojn de TEA-kotizo, FEI- kaj UEA-membrecoj, abonojn al diversaj ĵurnaloj kaj revuoj, aliĝon al UK ktp ktp. La sekretario peras abon-pagojn al LA GAZETO kaj membro-kotizojn de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista/Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj). Krome oni povas aliĝi al la 86^a Itala E-Kongreso, okazonta de la 24^a ĝis la 31^a de aŭgusto en Triesto.